

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 8-a parto
Claude Gacond, 148-a radioprelego, 1966.08.03 & 1966.08.06

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas la raporton pri la Nica Kolokvo, kiu pasintjare studis, kiel Unuiĝinta Naciaro adaptiĝu al la hodiaŭa mondo. La tunizia ambasadoro en Parizo, sinjoro Mohamed Masmoudi, dum diskuto, kiu sekvis la raporton de la franca eksministro Jules Moch, bone esprimis la senton de la subevoluintaj nacioj. Liajn dirojn ni citu :

A.- « Mi reprezentas landon konsiderata kiel tipa lando pro ĝia specifa karaktero kaj pro ĝia aparteno al la Tria Mondo ; tiu Tria Mondo, kiu kaŭzas hodiaŭ grandegajn problemojn al UN kaj al la tuta homaro.

Cl.- Tial miaj reagoj, mia sinteno povus ankaŭ esti tiuj de la malfavoritoj, kiuj plenigas la Trian Mondon, ekparolis ambasadoro Mohamed Masmoudi. Kaj li daŭrigis :

A.- En la kontakto kun la realaĵoj en UN ni konstatas, kiom la granduloj kaj la etuloj gajnas sin tendante la manon kaj kooperante. Sed la eksterordinara diferenco de povokapablo, kiu ekzistas inter la etuloj kaj la granduloj tiom akriĝas, ke hodiaŭ ni vidas du diversajn homkategoriojn :

Cl.- Tiuj, kiuj interesiĝas pri la luno, marso kaj la spaco.

A.- Kaj tiuj, kiuj frontas la problemojn de la **vivo sur la tero** mem, la ĉiutagan vivon.

Cl.- Oni sin demandas, ĉu la teranoj, kiuj ni estas, ni, la homoj en la Tria Mondo, havas ankoraŭ komunajn problemojn kun la lunuloj kaj la marsanoj, kiuj fariĝis la granduloj.

A.- Laŭmezure, kiam la granduloj antaŭeniras en la progreson, ni terurigas.

Cl.- Oni parolis pri ekvilibro bazata dank'al la timo, timo esti neniigota de la atomarmiloj... Ni posedas sendube la senton pri tiu timo, kaj tiu timo aldoniĝas al la alia, la ĉiutaga, la timo pri malsato, pri mizero, pri analfabetismo, ecoj por ni vivdecidaj, kiel la teknikaj problemoj trudataj de la malarmado. Ni eĉ ne rajtas doni teknikan informon pri tiu lasta temo. Tamen ni vere konas la problemojn. Se iufoje tiuj demandoj estos solvitaj, tiam povas esti, ke parto de la kreditoj rezervitaj al la nuklea armado povos fine helpi senpezigi la mizeron en la Tria Mondo.

A.- En UN ni ankaŭ laboradis, por ke la malvarma milito malakriĝu kaj por ke la tensio inter oriento kaj okcidento malaltiĝu. Sed ni havas la impreson, ke la malvarma milito hodiaŭ etendiĝas ĝis la kvar ĉespunktoj. Ĝi riskas fariĝi pli danĝera, ĉar ĝi oponas de nun la nordon al la sudo. Kiel eviti, ke akumuliĝu en la Tria Mondo eksplodaj fortoj, kies senbridiĝo riskos okazigi la plej terurajn katastrofojn kaj faligi la universon en terurajn kontraŭstarojn.

Cl.- Kion ni faru, ni, la etuloj ? Ni ne povas peti la grandulojn ĉesigi promenadi sur la luno aŭ redukti la militajn elspezojn. Kaj ni kredas, ke se ili elprenus parton el la enormaj sumoj, kiujn ili elspezas por la nuklea armado kaj por la konkero de la spaco, tiam ili ege kontribuu malakrigi la antagonismon inter la sudo kaj la nordo. Ni pensas, ke nia epoko ne plu devas esti stampata de la volo pri povo, sed de la volo pri kooperado...

A.- En UN oni tendencas nin konsideri kiel helpaj voĉoj por tia aŭ alia naciaro, kiu nin sollicitas kaj kies obea ŝuldanto ni estu por nia landa progreso. Vi scias, ke plej multaj el ni, kaj ĉiukaze Tunizio, ni elektis la ne-obeadon. Tio ne signifas neŭtralecon... Ni elektis la malfacilan vojon, kaj oni nin ne ĉiam komprenas. Eble ĉar ni estas malsanaj pro subevoluo kaj ne estas sufiĉe helpataj, ni malsanigis UN-on. Ĉu UN fariĝis malsana pro la

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 8-a parto
Claude Gacond, 148-a radioprelego, 1966.08.03 & 1966.08.06

Tria Mondo ? Nur la granduloj en kooperado kun la etuloj kapablas diagnozi la malsanon por ĝin kuraci.

Cl.- *Ni kredas, ke se la granduloj konsentus pli atenti pri la landoj de la Tria Mondo kaj ilin serioze helpi en ilia luktado kontraŭ la subevoluo, la solvo de la problemoj de UN estus pli facila. Tiuj problemoj, laŭ ni, estas nek juraj, nek financaj, sed moralaj.*

A.- Ĉu tiu detala citado de la ĉefaj eroj el la interveno de la tunizia ambasadoro sinjoro Mohamed Masmoudi ne estas impresiga pro la sincereco de sia tono ?

Cl.- Unu el la plej famaj francaj etnologinoj, sinjorino Germaine Tillion, post la pledado de la tunizia ambasadoro, venis siavice raporti pri zorgoj de la subevoluintaj landoj. Por ŝi la sola solvo al la subevoluo troviĝas en la kiel eble plej rapida lernejo de la tuta infanaro en tiuj landoj. Ni citu ŝin : *Sed totala unuagrada instruado eblas nur kun proporcia dua kaj supera instruado. La instruistoj kaj ĉiuj lernejoj servoj devas esti pretigitaj per taŭga supera formado. Kaj sinjorino Tillion demonstris, ke ju pli lando urĝe bezonas abiturientojn, des pli la formado de tiuj abiturientoj fariĝas multekosta. Niĝeria abituriento, ekzemple, kostas jare en sia patrio po 120'000 novajn francajn frankojn al la ŝtato. Niĝerio posedas loĝantaron trimilionan, do 600'000 infanojn en la lerneja aĝo. Ĝi bezonas 15'000 instruistojn, tio signifas 15'000 abiturientojn. Anstataŭ trovi tiujn 600'000 infanojn en la niĝeriaj lernejoj, en januaro 1961 ni trovis nur 24'000 infanojn en la unuagrada instruado kaj 1'350 geknabojn en la duagrada instruado.*

A.- *Alia lando, konkludis sinjorino Tillion, Tunizio, kiu estas la afrika lando, kiu kuraĝis plej rapide antaŭeniri en tiu lernejo de la infanaro, elspezas la trionon de sia buĝeto por la edukado.*

Cl.- Por sinjorino Tillion la sola valora helpo al la subevoluintaj landoj estas tiu, kiu favoras la malfermon de lernejoj kaj sendon de instruistoj en la landoj, kiuj ne povas de si mem formi sufiĉe rapide sian instruistaron. Ĉu la edukministerioj de tiuj landoj nur restu la propra afero de la koncernaj ŝtatoj ? Ĉu per monda kooperado ĝi ne fariĝu ankaŭ tasko de la riĉaj landoj pere de UN ?

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-